# Filipina Welser kaj aŭstria ĉefduko Ferdinando la II-a de Tirolo

| | | |
|---|---|---|
|  Filipina Welser |  |  Ferdinando en juna aĝo |
|  | Ferdinando en matura aĝo |   |

Ĉi-jare estis eldonitaj du eminentaj historiaj romanoj, kiuj priskribas la amon inter la ĉefduko Ferdinando kaj lia sekreta edzino, komercista nenobela filino Filipina Welser. La unuan romanon verkis Antonín Polách, la romano titolas *Respektu vian patron, sed amu edzinon vian* (Cti otce

svého, ale miluj ženu svou) kaj plene okupiĝas pri la vivo de la geamantoj. La alian romanon verkis Václav Křístek sub titolo *Malgajni la sunon antaŭ la tagiĝo* (Prohrát slunce před svítáním), ĝia ĉefa heroo estas Jakub Krčín z Jelčan, fama konstruisto de fiŝlagoj, sed eble cent paĝoj estas dediĉitaj al Ferdinando kaj Filipina. Kiuj estis tiuj du homoj?

En aŭgusto 1526 la ĉeĥa kaj hungara reĝo Ludoviko Jogajlido (Ludvík Jagellonský) batalis kontraŭ la turka sultano Solimano la II-a en marĉejoj apud la sudhungara urbo Mohács. La turka armeo estis duoble pli granda kaj venkis lin. La reĝo volis forkuri tra marĉejoj, sed dronis tie en sia dudeka jaro. La ĉeĥaj grandnobeloj en oktobro samjare elektis kiel ĉeĥan reĝon aŭstran dukon Ferdinandon Habsburgon kaj en decembro simile elektis lin la hungaraj nobeloj kiel hungaran reĝon. Ferdinando estis edzo de Anna Jogajlidino (Anna Jagellonská), al kiu li edziĝis jam en 1522, do kvar jarojn pli frue. En 1531 li fariĝis romgermana reĝo kaj en 1558 imperiestro.

En 1527 naskiĝis kronprinco Maksmiliano, estonta reĝo kaj imperiestro, en la jaro 1529 dua filo, duko Ferdinando la II-a, heroo de nia rakontado, en 1540 tria filo Karolo. Naskiĝis ankaŭ 11 filinoj, kiuj estis poste edzinigitaj al diversaj eŭropaj regantoj por plifortigi la dinastiajn interesojn de Habsburgoj. En 1547 mortis la edzino Anna kiel 44-jara dum akuŝo de la lasta infano. Reĝo Ferdinando tre funebris, neniam plu edziĝis kaj neniam ĉesis porti nigran veston ĝis sia morto. Li estis tre laborema homo, li laboris de mateno ĝis vespero por solvi diversajn problemojn de sia granda regno. En la sama jaro li nomunis sian duan filon Ferdinandon, tiam 18-jaran, vicreĝo de Bohemujo.

La reĝo pli amis sian duan filon, kiu heredis ne nur lian nomon, sed ankaŭ talenton por regado, dum Maksmiliano ŝajnis al li malfortulo, plie inklinanta al luteranaj herezuloj. Sed Maksmiliano estis pli aĝa kaj tial devis fariĝi heredanto de la trono. La dua filo Ferdinando bone administris Bohemion kaj fariĝis tre populara. Apud Prago li komencis konstrui Pavilonon Stelo (Letohrádek Hvězda), en kiu li intencis kolekti artismajn kaj historiajn objektojn, sed kiam li fariĝis ĉefduko de Tirolo, li translokiĝis al Insbruck kaj transportis ĉiujn trezorojn al kastelo Ambras. Sed tio okazis post la morto de la patro en 1564, kiam nova imperiestro, lia frato Maksimiliano, sendis lin al Tirolo.

Nia rakontado komenciĝas 7 jarojn pli frue en 1557. Tiam la 28-jara duko Ferdinando organizis en Pilseno kavaliran turniron kaj rimarkis tie belan junulinon Filipina Welser. Interparolante kun ŝi li konstatis, ke ŝi estas ne nur bela, sed ankaŭ tre sprita kaj inteligenta, simple li enamiĝis al ŝi. Eĉ ne gravis por li, ke ŝi ne estis nobelino, sed nur filino de riĉaj komercistoj el Augsburg, kiuj pruntadis monon ankaŭ al lia imperiestra patro. Li sciis, ke lia patro rifuzus peton permesi la geedziĝon, eĉ se ŝi estus nobelino. La imperiestro planis por sia filo edziĝon kun la angla reĝino Elizabeta, kio servus al liaj politikaj planoj. La amata filo fariĝus reĝo kaj la protestantisma Anglio estus regata de katolika Habsburgo. Filipina loĝis en kastelo Březnice apud Příbram ĉe sia onklino Katarina el Lokšany. Ferdinando tien alveturadis ofte, ĉiuj pensis, ke li volas fari el Filipina sian konkubinon. Sed li proponis al ŝi sekretan edziniĝon. Ĉiuj timis la koleron de la imperiestro, la pastro kaj la atestantoj komence rifuzis, sed kiam la duko minacis per sinmortigo, ili konsentis. Sed neniu alia en la kastelo krom ili, la pastro kaj du atestantoj, sciis pri la geedziĝo. Naskiĝis al ili tri filoj kaj ili ĉiam metis la novnaskiton antaŭ la pordon de la kastelo kaj ŝajnigis, ke lin metis tie nekonata, certe malfeliĉa patrino. La kortuŝita Filipina poste deklaris, ke ŝi adoptas la infanon kaj edukos lin kiel sian propran.

La sekretaj geedzoj translokiĝis al la kastelo Křivoklát, kiu estas pli proksime al Prago. Nun la rakontado de ambaŭ verkistoj diferencas. Antonín Polách rakontas, ke Ferdinando mem diris al sia patro, ke li ne povas edziĝi al la angla reĝino, ĉar li jam estas edziĝinta kaj ĉar li sian edzinon amas pli ol sian propran vivon. Kiam la furiozanta imperiestro trankviliĝis kaj vidis, ke li vane klopodas konvinki la filon pri nuligo de la geedziĝo, li deklaris, ke li toleros la situacion sub kondiĉo, ke ĉio

restos en sekreto kaj liaj nepoj havos neniajn rajtojn heredi la tronon. Do la translokiĝo al Křivoklát estis puno de la imperiestro, por ke ili estus sub kontrolo, kaj la geedzoj timis ian insidon de lia flanko. Male Václav Křístek opinias, ke la imperiestro sciis nenion kaj ili mem transloĝiĝis al Křivoklát, por ke Ferdinando povu pli ofte veni de sia Praga administrejo. Sed ambaŭ verkistoj akordiĝis en tio, ke en Křivoklát estis en malliberejo episkopo de ĉeĥaj fratoj Aŭgusto, fermita en la kelo kun sia servisto, ankaŭ herezulo. Filipina estis kortuŝita de lia sorto, vizitadis lin kaj klopodis pri lia liberiĝo. Sed ĉar li ne volis rezigni pri sia herezo, oni ne permesis liberigi lin, tamen li rajtis fari de tempo al tempo promenon interne en la kastela korto. Tamen unu verkisto asertas, ke la episkopo Aŭgusto ne sciis la germanan lingvon kaj interparolis kun Filipina pere de interpretisto, dum laŭ la alia verkisto li parolis germane same bone kiel ĉeĥe kaj sekve li bezonis nenian interpretiston.

Filipina Welser mortis en la jaro 1580 en Insbruck. Ŝia vidvo edziĝis denove en 1582 kaj mortis en 1595.

Filipina estis tre klera virino, kiu okupiĝis pri kuracado kaj medikamentoj. Ŝi postlasis du manuskriptojn de libroj, nome kuirlibron kaj libron pri kuracistaj plantoj.

*Miroslav Malovec*
*bildoj el Vikipedio*